

# Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika  
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

## AVENTURO EN LA MONTARO

El «La Tria» de H. SIENKIEWICZ.

Foje, vojaĝante kun mia amiko Swiatecki, ni perdis la vojon en la montaro, en Salzkammergut, ĉirkaŭ Zell am See.

Ĉar venis la nokto kaj estis facile rompi la kolon, do Swiatecki diris al mi :

— Aŭskultu, Wladek, vi havas pli grandan talenton, do estus pli granda domaĝo, se vi pereus. Mi iros antaŭe... Se mi falos malsupren, vi restos sidanta sur via loko ĝis la mateno, kaj matene vi jam iel helpos al vi.

— Vi ne iros antaŭe, — mi respondas, — sed mi iros antaŭe, ĉar mi havas pli bonajn okulojn.

Tiam diras Swiatecki :

— Se mi ne rompos la kolon hodiaŭ, mi malgraŭ tio trovos ie mian finon... estas al mi tute egale.

Ni komencas disputi.

Dume fariĝas malhele, kiel en kelo. Fine ni interkonsentas, ke ni tiros lotojn. Ni lotas.

Swiatecki eltiras la nodon kaj marŝas antaŭen.

Ni iras sur monta dorso. Komence ĝi estas sufiĉe larĝa, poste ĉiam pli mallarĝa. Kiom ni povas konjekti, dekstre kaj maldekstre estas abismoj, certe senfundaj.

La dorso fariĝas ankoraŭ pli mallarĝa, kaj, kio estas pli grava, la pecetoj de putrintaj rokoj forŝoviĝas el sub niaj piedoj....

— Mi iras kvarpiede, ĉar alie ne estas eble, — diras Swiatecki.

Efektive, alie ne estis eble, ni do malleviĝas sur la manojn kaj ni iras plue kiel du ŝimpanzoj.

Sed baldaŭ montriĝas, ke ankaŭ tio nenion helpas.

La roka dorso fariĝas ne pli larĝa ol dorso de ĉevalo. Swiatecki sidigĝas rajde, mi post li, kaj apogante nin per la manoj antaŭ ni, ni ŝovigĝas antaŭen, kio iĝas eksterordinare malutila por niaj vestaĵoj.

Post kelka tempo mi aŭdas la voĉon de Swiatecki :

— Wladek !

— Kio do ?

— La dorso finiĝis.

— Kaj kio plu ?

— Malplene . . . devas esti abismo.

— Prenu do ian ŝtonon kaj ĵetu . . . ni aŭskultos, ĉu ĝi falos longe.

En la mallumo mi aŭdas, kiel Swiatecki palpas per la manoj, por trovi peceton da putrinta roko, kaj poste diras :

— Mi ĵetas . . . aŭskultu !

Ni ambaŭ streĉas la orelojn . . . Mallaŭto.

— Vi aŭdis nenion ?

— Nenion.

— Ni aranĝis nin bele ! devas esti ĉirkaŭ cent klaftoj.

— Ĵetu ankoraŭ unu fojon.

Swiatecki trovas pli grandan peceton, kaj ĵetas.

Nenia resonado.

— Ĉu tie estas nenia fundo ? — diras Swiatecki.

— Nenio helpas ; ni sidos ĝis mateno.

Kaj ni sidas. Swiatecki ĵetas ankoraŭ kelkajn ŝtonojn ; ĉio vane. Pasas unu horo, la dua, fine mi aŭdas la voĉon de Swiatecki.

— Wladek, sed ne ekdormetu . . . ĉu vi ne havas cigaredon ?

Montriĝas, ke mi havas cigaredojn, sed la alumetojn foruzis ni ambaŭ. Malespero. Povas esti la unua horo de l' nokto, aŭ malpli.

Komencis pluveti. Ĉirkaŭe estas nepenetrebla mallumo. Mi konvinkigĝas, ke vivante inter homoj, en urboj aŭ vilaĝo, ni havas nenan ideon pri tio, kio estas mallaŭto. La mallaŭto, kiu nin ĉirkaŭas, eĉ zumas en la oreloj.

Mi aŭdas preskaŭ, kiel la sango rondiras en miaj vejnoj, kaj la batadon de l' propra koro mi aŭdas bonege.

Komence nia situacio interesas min.

Sidi dum silenta nokto sur roka dorso kiel sur ĉevalo kaj krom tio super nesondebla abismo, tio ne okazas ja

facile al iu urbano ; sed baldaŭ fariĝas malvarme ĉiam pli sentiga.

Swiatecki ĵetis ankoraŭ kelkajn ŝtonojn, ripetis ankoraŭ kelkfoje : « Eĉ ne aŭdebla ! » kaj poste ni silentis ĉirkaŭ tri horoj.

Ŝajnis al mi, ke baldaŭ devis tagiĝi, kiam subite mi ekaŭdis super niaj kapoj la grakadon kaj la bruon deflugiloj.



ANTONI GRABOWSKI (Polo)

*Direktoro de la Akademia Komisiono por la Gramatiko.*

Estis ankoraŭ mallume, kaj mi nenion povis ekvidi, sed mi estis certa, ke agloj komencas rondflugi super la abismo ; « gra ! gra ! » aŭdiĝis ĉiam pli forte supre en la malhelo. Mirigis min-tio, ke estis aŭdeblaj tiom da voĉoj, kvazaŭ transflugus tutaj legioj da agloj. Sed malgraŭ ĉio, ili anoncis la tagon.

Efektive, post kelka tempo, mi ekvidis miajn manojn apogitajn sur la roka bordo, poste montriĝis antaŭ mi la dorso de Swiatecki, tute kiel nigra silueto sur iom malpli



nigra fono. Tiu fono paliĝis ĉiumomente. Poste belega pal-  
arĝenta nuanco komencis tralumi sur la roko, sur la dorso  
de Swiatecki kaj saturis ĉiam pli la malhelon, tute kvazaŭ  
iu alverŝadus al ĝi arĝentan fluidaĵon, kiu ensorbiĝadus  
en ĝin, miksis sin kun ĝi, faris ĝin el nigra — griza, el  
griza — perlolora. Estis en tio samtempe ia krudeco kaj  
humideco, ne nur la roko, sed ankaŭ la aero ŝajnis esti  
malseka.

Ĉiumomente fariĝas pli lumplene.

Mi rigardas, penas fiksi en mia memoro tiujn ŝanĝojn  
de l' tono kaj iomete mi pentras en la animo, kiam subite  
interrompas min la ekkrio de Swiatecki :

— Fi ! idiotoj !

Kaj lian dorson mi perdas el miaj okuloj.

— Swiatecki ! — mi krias, — kion vi faras ?

— Ne kriegu ! Rigardu !

Mi kliniĝas, rigardas. Kio montriĝas ? Jen mi sidas  
sur roka dehakaĵo, eniĝanta en herbejon, kiu kuŝas eble  
unu metron pl' malsupre. La muskoj mallaŭtigis la resonon  
de la ŝtonoj, ĉar cetere la herbejo estas tute ebena, mal-  
proksime estas videbla la vojo, sur ĝi la kornikoj, kiuj  
ŝajnis al mi esti agloj.

Ni bezonis nur malsuprenlasi la piedojn el la roko,  
por iri tute trankvile hejmen.

Anstataŭ tio ni estis sidantaj sur la roka dehakaĵo kaj  
klakis per la dentoj dum la tuta nokto.

*Tradukis* ANTONI GRABOWSKI.

---

## PUURULO

El « Altajaj Mirrakontoj » de S-ino A. MIRSKAJA.

### I

En « maljunulina » monato <sup>(1)</sup> li eliris el ŝtonoj kaj venis al  
homoj ; la neĝo falis tiel amasege, ke estis miraklo, ke li pied-  
iris tra ĝi sen helpo de neĝglitiloj, kun la multepezaj saketoj sur  
la dorso, en kiuj li alportis ĉion el sia loĝejo inter la ŝtonoj, kie  
la kreviga frostoj tedis lin kaj elpelis al homoj.

Mi memoras, ke ni, infanoj de negranda vilaĝo, en kiu el-

---

(1) « Maljunulina » monato = Novembro.

kreskis ankaŭ mi, la filo de l' komercisto-elmigrinto, ĉirkaŭis lin kaj rigardis lian kapon blankan kiel lino, kaj liajn profundajn, mallargajn okulojn. Foje ni donis al li la alnomon « Puurulo »<sup>(2)</sup> kaj tiu alnomo inokuligis. Certe en la vilaĝo oni konis lian nomon; oni ankaŭ sciis, ke li estas « rimĉi'o »<sup>(3)</sup>, kaj oni lin estimis kaj timis tie en la ŝtonoj de lia valo, sed ĉi-tie li tiel por ili, kiel por ni infanoj fariĝis la bona Puurulo, kaj liaj karesaj, trankvilaj okuloj tute ne timigis nin.

— Mi volas ripozi, — parolis li, — mi laciĝis sorĉi, mi ne devas sorĉi, mi neniam ĝin ŝatis; tiel estis bezone: la avo sorĉis, la patro ankaŭ, kaj la samo decidis al mi, sed mi ne sorĉos plu.

Ni, infanoj, ni alligigis al li kun tuta animo. Kiel bone li sciis rakonti kaj respondi niajn esloremajn demandojn! Ne amis lin nur mia duonpatrino, bela kumandanino<sup>(4)</sup> kun eterne mallevitaj okuloj; en ŝia ĉeestado fratino kaj mi sentis sopiron kaj enuon, kaj apude kun ŝi la gaja patro, dediĉanta tutan sian libertempon al ĉasado, ŝajnis al ni ankoraŭ pli agrabla kaj pli kara.

Puurulo ankaŭ ne amis nian duonpatrinon; lia vizaĝo fariĝis severa, kiam ŝi venis, kaj li neniam respondis ŝian saluton. Iufoje li demandis, el kiu vilaĝo la patro prenis mian duonpatrinon, kaj kiam mi ĝin nomis, li severe kuntiris la brovojn; al mi ŝajnis, ke li konis ŝin pli frue, sed pri tio li ne parolis al ni, kaj mi ne memoras, de kie aperis en nia koro la certigo pri tio. Mi jam diris, ke la duonpatrino estis bela, altkreska, gracia virino kun grandaj okuloj kaj kun tute neplata nazo; ŝi havis belan buŝon kaj freŝan vizaĝon; ŝiaj dentoj similis al perleroj; la harligoj, grandegaj kaj multepezaj, ornamitaj idolane per « jalambaŝk'oj »<sup>(5)</sup>, mallevigis ĝis la genuoj. La patro ŝin amis; oni diris, ke li konatiĝis kun ŝi ankoraŭ dum la vivo de nia patrino, kiu estis ŝia amikino en tiu lando, kien ili ofte veturis pro aferoj. La patrino estis ŝia baptopatrino; poste, kiam la patrino perdiĝis en la tempo de ventego inter la montoj, kien ŝi iradis por beroj: ŝi tre baldaŭ fariĝis nia duonpatrino. Ŝi neniam nin batis kaj estis rilate al mi eĉ afabla, sed ŝiaj grandaj nebonaj okuloj rigardis la fratinton iafaje per tiela rigardo, ke ni ektremis pro timo.

La fratino, bela, blonda knabineto, kun bluaj okuloj, estis du jarojn pli aĝa, ol mi; ŝi bone memoris la patrinon, al kiu, oni diras, ŝi tre similas, kaj malvarme rilatis al la duonpatrino.

Kiam mi forveturis en lernejon en B., ŝi estis tute sola kaj ĉe la apero de Puurulo kvazaŭ fariĝis gaja, en foresto de l' patro,

(2) Puurulo = Grizulo.

(3) Rimĉi'o = antaŭdiranto-sorĉisto, kvazaŭprofeto.

(4) Kumandanoj (alie teleŭtoj aŭ blankaj kalmikoj) = nemultenombra indiĝena gento loĝanta sur Altaĵo (Sibiria monta ĉeno), laŭlonge de la rivero Bija.

(5) Jalambaŝkoj = ornamaĵoj el kupraj butonetoj, konkoj kaj serpentokapoj.

kiu pasigis la tutan tempon en tendo de Tempašov, de riĉa indiĝeno, parenco de la maljuna rimĉi'o. En tiu jaro oni min forveturigis nur antaŭ Kristnasko, — kaŭze de malsano elportita de mi dum la somero, — kaj dirante adiaŭon al mi, kiel ĉiam kun larmoj, Olnjo ekmurmuris :

— Ne malĝoju, Konstaĉjo, mi ne timas ŝin ; Puurulo ja estas kun mi.

## II

Puurulo do estis alligita al Olnjo.

Alveturinte somere, mi ne trovis la fratinton hejme ; la patro ridante diris al mi :

— Ŝi estas ĉe sia « abŝako » (6), amikiniĝas kun Puurulo ; kio do ? li ja estas bona maljunulo . . . Olnjo kresku en libero, ŝi do tirigās je longeco kaj maldikeco, kiel tremoleto. Vi scias, Konstaĉjo, Tempašov aranĝis la tendon apud la lago por Puurulo ; estas bone tie, kaj de homoj ne estas malproksime, kaj trankvile ; Olnjon hejmen alpelas la nokto. Barbaro estas ĉiam sola. Sed tiel estas pli bone, — aldonis li mallaŭte. — Vi ja vivas pace kun ŝi, Konstaĉjo. Stranga estas ŝi, Kristo gardu ŝin, kaj ne malbona, sed kiu konas, kia estas ŝi. Bona mastrino ŝi estas, tamen ne tia, kia estis via patrino.

La duonpatrino tre amis la patron. Kiam li alvenis hejmen, ŝiaj okuloj mallumaj ekbrulis per delikateco, ŝi kun li interparolis afable kaj ridis, sed havis apartan belan infektoman ridon, kaj ŝia vizaĝo fariĝis ĉarma kaj mirinde beligis. Mi opinias, ke oni ne povis ne ami lin grandegulon kaj belulon kun krispa kapo kaj gaja rideto sub la molaj lipharoj ; lin ŝatis ĉiuj, kiuj ajn komencis rilatojn kun li, kaj oni ne povis alie agi ; tiel bona, afabla kaj karesa li estis por ĉiuj.

Mi do ekkuris tuj al Olnjo kaj trovis ŝin apud granda, nova tendo, kiun apenaŭ mi rimarkis en la densaj arbataĵoj. Puurulo sidis sur ŝtono, kaj rabotis per tranĉilo iun vergon, apud li kulis fiŝoj « hariusoj », grandaj, brilaj, kun makuletoj sur la skvamo jam disigitaj kaj salitaj.

— Puurulo, — mi aŭdis la voĉon de Olnjo. — Mi ekbruligis lignaron, alportu la fiŝojn. Ni havos bonan tagmanĝon. Ho, se Konstaĉjo alveturus hodiaŭ !

Mi jam estis alveninta tien kaj ĝoje kriis al Olnjo pri tio. Ili ambaŭ neesprimeble ekĝojis je mi ; Olnjo ĉirkaŭprenis mian kolon, kaj la vizaĝo de Puurulo eklumiĝis per rideto tiel bona, tiel afabla, ke mi sentis dolĉe en mia animo.

— Mi estas kun li tie ĉi ĉiam, — gaje parolis Olnjo. — Mi

---

(6) Abŝak'o = urso.

foriros, vizitos la patron kaj poste revenos tien ĉi ; ne vidi longa-tempe ŝin, nian duonpatrinon, estas por mi feliĉo. Jen ŝi ja ne parolis al mi eĉ malbonan vorton, sed ŝi tiel tranĉas per sia rigardo, kvazaŭ kunligus miajn manojn. Tie ĉi, kia libereco, Konstaĉjo ! Fiŝojn ni kaptas, fabelojn ni rakontas, la avo Puurulo al mi parolas pri antikva tempo, li diras pri diversaj sekretoj. Kaj simple nenion farante ni sidas apud la lago : estas pace, libere. Mi ĉiam petas lin : « Puurulo, sorĉu pri panjo, kie estas ŝi ; eble mi povus ektrovi ŝiajn ostojn por ilin enterigi » ; li nur respondas, ke li ne volas.

— Aliru ! — vokis nin la maljunulo. — Gasto, sidiĝu. Ĉu vi ne fumas pipon ? Je kio mi regalu vin ?

Kaj mi, por lia ĝojo, bonege satiĝis per fiŝoj kaj fromaĝo, kiun alportis liaj respektantoj, kaj maturaj fragoj kolektitaj de Olnjo.

### III

Bonaj tagoj pasis por mi dum tiu ĉi somero : tage mi kuradis tra la montoj kun la samaĝuloj ; sed la vesperojn, senescepte, ĉu estis bela vetero, ĉu pluvo, pasigis ĉe Puurulo ; dum serenaj tagoj ni foriris al la lago.

— Ha, Puurulo, — parolis Olnjo rigardante, kiel mi kaptadas verdajn akvajn nuksojn jam maturiĝintajn de sur flosa, tie ĉi, apud la lago. — Mi ĉiam rememoras la patrinajn rakontojn : naŭ jaroj ja pasis de tiu tempo, kiam ŝi, malfeliĉulino mia, perdiĝis ; okazis, ni sidas apud la lago, la patro eknaĝas por la nuksoj kaj ŝi al mi rakontas : « Rigardu, Olnjo, — ŝi vidigas ĉirkaŭe, — jen tia lago ekzistis en Sankta-Lando, kaj la Savinto tiel, kiel via patro denaĝis nun, denaĝadis el la bordo, por ke la popolo ne puŝu Lin. Kia bona estis Li, Olnjo ! Ankaŭ la subiranta suno orumis la akvon, la montoj dormetis kaj la surbordaj arbetaĵoj ombris la akvon. » Neniu de tiam parolis al mi pri Kristo, Puurulo, post kiam ŝi estis malaperinta.

Mi nevole enpenŝiĝis kaj longedaŭre rigardis, aŭskultante la parolon de l' fratino, en kiu sonis signoj de malĝojo.

— Sed vi, malfeliĉulo, — daŭrigis ŝi, — vi Lin tute ne konas, sed Li estas tiel bona, tiel bona, Puurulo.

— Jes, vere, mi ne konas Lin, — ankaŭ malĝoje diris la maljunulo. — Mi konas multe pri bona « ulgeno » (7) kaj pri malbona « erliko » (8). Mi scias adori la sunon kaj la lunon, la montojn, la lagojn kaj la riverojn, sed mi malmulte aŭdis pri « Kuda'o » (9).

— Jes, — malĝoje diris Olnjo. — Oni ne instruis vin por

---

(7) Ulgen'o = bona spirito.

(8) Erlik'o = malbona spirito.

(9) Kuda'o = Dio.

adori Lin, vi ne estas kulpa pri tio, Puurulo. Mian duonpatrinon oni instruis adori Lin, ŝi tamen ne konas Lin : ŝi havas idolon, kiun ŝi adoras sekrete, kaŝite je la patro.

— Via duonpatrino havas malbonan koron, ŝi estas mallumo, — diris li murmure. — Mi konis ŝian patron ; li estis de malproksime, tie, sur Kondomo. . . . La maljuna Puurulo konis multajn.

Ili silentiĝis, kaj Olnjo komencis rigardi la lagon, sur kiu la kvieta akvo ŝajnis rozkolora pro la sunsubiro, mi albordiĝis kaj elŝutis antaŭ ilin tutan korbon da nuksoj.

— Ĉu vi do scias, Puurulo, — diris mi, — kiu kreis ĉi-tiun mondon ?

Mi memoras, mi volis fanfaroni je miaj lernejoj ; sed Puurulo nur ekridetis.

— Kiam ankoraŭ ekzistis nek la suno, nek la tero, — komencis li, elĵetinte el sia pipo cindron kaj enmetante en ĝin tabakon, — ekzistis sola ulgeno. Li flugpendis, kiel vesperto, kaj tremetis super la dezerto senborda ; tie malsupre ne estis firma loko, sur kiun li povus stariĝi ; tiam li aŭdis en si voĉon : « kaptu antaŭen ! » kaj li, tirinte antaŭen la brakon, ekkaptis antaŭ sin. Li trafis ŝtonon, elstarantan el akvo ; li sidigis sur tiun ĉi ŝtonon kaj ĉiam parolis : « kaptu antaŭen », kaj meditis, kion kaj kiel fari. Subite el la akvo eliris blanka virino kaj diris al li : « kion ajn oni intencas krei, oni nur diru : mi faris, ĝi fariĝis kaj tiel estos ». Dirinte tion, ŝi venis plu al neniŭ. Jen pro tio do ulgeno, kreinte homojn, donis al ili la ordonon : « pri tio, kio estas, oni ne parolu nee ; se tamen oni parolos nee pri tio, kio estas, eĉ tio ne estos ».

Li fumis sian pipeton kaj daŭrigis rakonti al ni interesigantaj pri lia stranga legendo :

— Ulgeno ankaŭ faris en la maro tri grandegajn fiŝojn kaj kreis sur ili la teron ; du el la fiŝoj li starigis sur la randojn, kaj unu mezen sub la tero ; ĉi-tiu meza estas turnita per la kapo norden. Kaj kiam ĝi klinas la kapon malsupren, tiam norde fariĝas marĉejoj ; kiam ĝi klinos pli malsupren, ĝi dronigos la tutan teron. Oni do faris al ĝi hokon sub la blankoj, je la hoko kaptoŝnuro estis alligita, kies alia fino estis altirita supren en la ĉielon kaj tie volvita ĉirkaŭ tri kolonoj, tiel, ke oni povu, transvolvante de unu sur la alian, altiri supren aŭ malsupren la kapon de l'fiŝo. Tiun ĉi aferon administras la grandegulo Ulgeno Mangdi-Ŝire'o. Kiam li malvolvas la finon de la kaptoŝnuro de unu kolono, la tero kliniĝas norden kaj fariĝas marĉejoj sur ĝi, kaj se li malvolvas ĝin de la dua, la tuta tero dronus, kio foje jam okazis.

La maljunulo haltis kaj ĉesis paroli, fikse rigardante antaŭ sin : tie, apud la lago, en strio de la sunsubiro staris la duonpatrino kaj rigardis nin per siaj mallumaj okuloj, kaj ĉi-tiu rigardo



haltigis la rakonton de Puurulo ; ŝi rimarkis, ke oni ŝin ekvidis, sed ŝi ne foriris, male, ŝi sin direktis renkonten al ni.

— Pro kio vi iras tien ĉi ? — demandis Puurulo kolere, kaj ŝi fleksis sin antaŭ li. — Ĉu vi, malbona animo, ree malbonintencas ion ? — Kaj li sin levis, disigante la brakojn kaj ŝirmante nin kontraŭ ŝi. — Mi parolis iam al vi . . . ĉu vi forgesis, ke vi ne devas aliri al la loĝejo de Puurulo ?

— Mi venis por la filino, — diris ŝi mallaŭte, ne levante la okulojn.

— Pro la filino ? ! — minace li diris kun fulmantaj okuloj. — Pro kies filino vi venis ? Gardu vin kontraŭ mi : la lango de Puurulo ne ĉiam estos muta, ĝi povas paroli tion, kio vin povas tremigi. Kaj kiel via lango povas turniĝi kaj alvoki tiujn, kiujn altuŝi ne devas viaj manoj ? Foriru, foriru, kaj ne venu plu al la loĝejo de Puurulo ! Kaj, se vi ektuŝos la infanojn, rigardu . . . ĉu vi forgesis la rimĉi'on en la ŝtonoj de Boltir-oeĉ'o<sup>(10)</sup>, aŭ vi ne rekonis lin en Puurulo ?

Ŝi mortepala de longe sin formovis de li ; poste deturniĝis kaj, kiam ŝi aŭdis la lastajn vortojn, ŝi ekkuris. Olnjo kun petego ekkaptis la manon de Puurulo.

— Kial ŝi vin timas ? kion vi scias pri ŝi ? Diru, Puurulo, eble vi scias pri la patrino ? Al mi longatempe ŝajnas, ke ŝi estis ŝin mortiginta . . .

— Silentu, — diris li severe. — Ulgeno donas al la homoj la tempon, por ke ili pentu, sed al aliaj ordonas gardi la silenton. Multe da sekretajo estas sur la mondo. Tiu ĉi virino havas malbonan animon el sia infanaĝo ; ŝi naskiĝis kun malbona animo. Mi ŝin konis. Ŝi forgesis Puurulon, sed Puurulo ne forgesis ŝin. Nun ĉio estos sciigita. Ne demandu min ; mia animo denove tremetas, kaj la kara-neme'oj reprenis la potencon super ŝi. Vin gardu kontraŭ ŝi : ŝi pensis, ke mi konstante loĝis en miaj ŝtonoj en la valo, ĉar oni tiel informis ŝin ; ŝi ne sciis vere, ke mi loĝis en intermonto de Boltir-oeĉ'o, kie la spirito de l' blanka virino vagas super la abismoj, kaj rimĉi'o, mia patro, havis la loĝejon apud la akvofalo.

Mi terurigiĝis kaj staris sendecida. Por iri hejmen mi ne havis la kuraĝon, pro timo al la duonpatrino ; por resti tie ĉi mi ankaŭ ne havis la forton, timigite de la vortoj de Puurulo tiel, ke kiam la kara voĉo de l' patro, post duonhoro. vokinta nin, interrompis nian longan silenton, nin ĝojo ekkaptis.

— Patro ! — sin ĵetis al li Olnjo kaj subite ploregante falis sur lian bruston.

— Kio estas al vi, mia karulino ? kio ? — parolis li ameme, karesante ŝiajn blondajn harligojn.

(10) Boltir-oeĉ'o = Akvofalo proksima al Ĉomalø.

— Nu, maljunulo, — li sin turnis poste al Puurulo, — donu pipon. Mi venis ĉe vi sidi. Mia Barbaro forrajdis ien. Ne ofendiĝu, avo ; kiam ŝi nur vidas vian maron, senkaŭze ŝi freneziga.

— Ĉu ŝi forrajdis ? — ekstremis Puurulo. — Aga ! malbona animo altiriĝis al malbona afero, la tempo venis, atakis . . . . Prenu Konstaĉjon, Dmitrio, selu ĉevalon kaj ordonu al la hundo serĉi ŝin ; tiel estas necese. Mi gardos la knabineton. Estas bone, ke okazis ; ŝiaj manoj ne kuraĝis ree leviĝi, sed la kara-neme'oj ŝin altiris tien, kien ŝi ekiris.

— Mi estos kun vi, patro, — diris Olnjo, — mi timas resti tie ĉi. Puurulo, rajdu ankaŭ vi kun ni. Sed, pro Dio, ni rajdu, ni forrajdu, pro ŝi, patro !

Ankaŭ la patron ekkaptis la komuna ekscitiĝo ; ni kun li kuris en nian domon, ordonis al la laboristoj seli kvar ĉevalojn ; kaj Puurulo, veninta pro ni, diris kvazaŭ ordone al la patro, ke li kunprenu du aŭ tri fremdajn personojn el nia vilaĝo.

*(Fino en la venonta numero.)*

*Kun la permeso de l'aŭtorino tradukis*

V. KANDALOV.

## BONVENO

De CHARLES KINGSLEY.

Vintra vent', bonvenu ! Ne pri vi poet' Iam kantis, kvankam Ĉia pri ventet'.	Maldolĉege muĝu Tra la pinarbar', Dum blankigas teron Ofta neĝer-ar'.	Tamen ĉiujn ĉiel Malfortigas ĝi ; Per veter' malvarma Fortegiĝas ni.
Ho ! bonvenu, trans la Stepoj de Danuj', Trans malvarma maro Norda el patruj'.	Ho ! aŭskultu, preter Step' kaj promontor' Vent' blovadas ; forta Estas vulpodor'.	Sudventeto taŭgas Nur por virinar', Logas ĝi fianĉojn Hejmen el kampar'.
Nin somer' ektedas Kun sunhelegec', Kun pluvet' facila, Kaj la varmegec'.	Hundoj tra la neĝo, Nun antaŭen vi ! Sekvos kiel eble Plej rapide ni.	Sed nordorienta Kaj neĝplena vent' Pelas Anglojn for al Ĉiu kontinent'.
Per trankvilaj tagoj Enuadas ni, Ĝoja vent' de vintro, Nin ludigu vi.	Kontraŭ forta vento Hundoj, iru for ! Vulpon vi ekkaptos Jam post unu hor'.	Venu, kiel venis Nia prapatrar', El land' orienta Mastroj de la mar'.
Klinu junkojn, movu Supron de laget', Malsatigu fiŝojn En la riveret'.	Iru, kaj pri ĉaso Morgaŭ sonĝu vi, Dum glitadas gaje Sur lagetoj ni.	Sangon, ho ! ekscitu Nian, ke en ni Korp' kaj cerb' fortiĝu ; Blovu, vent' de Di' !
Vintra de birdaro Sonu nun la pep', Tra la tuta land', de Marĉo, lago, step'.	Dum sudvent' blovetas Ĝoju junulin', Ĉar junulo tiam Amindumas ŝin.	<i>El la angla lingvo tradukis</i> G. M. HOLLIS.

## FELIETONO

### Kaj tamen li ridis.

Mister Mark Jones Skart estis milionulo kaj mizerulo. Tio okazis antaŭ multe da tempo, preskaŭ du cent jaroj....

Bone; Mister Jones malŝatis la rabistojn, ne pro iliaj ecoj personaj, sed ĉefe pro iliaj specialaj moroj. Tio estis la kaŭzo de tio, ke li ĉiam vojaĝis kunportante kiel eble plej malmulte da mono, fidante al sia kredito, kaj timante ruzulojn, kiuj malplenigas la poŝojn de tro naivaj aŭ konfidemaj vojaĝantoj.

Tre bone; tra Kalifornio li vojaĝis rajdante sur ĉevalo. Rabistaro atakis lin kun la de ĉiu parkere konata frazo: « aŭ monon, aŭ vivon! », kaj Mister Mark tamen ridetis....

— Jen, du dolaroj.

— Rabisto! senpenulo! Kia trompo!... k. t. p.

Poste, multe da bruo kaj da piedrapoj al la malantaŭa parto de la milionulo... kaj kaŝita ekrido de tiu ĉi lasta, kiu konsideris, ke li sukcesis tiel malkare solvi la aferon.

Subite unu el la rabistoj diras al li:

— He, malfermu la buŝon!

— Sed...

— Mildiablo! malfermu la buŝon! Ĝi ja estas vera orminejo!

Mister Mark Jones Skart elportis nepriskribeblan turmenton, kiam oni eltiris el lia buŝo la tiel fiere de li vidigatan artan oran dentaron....

*El kataluna lingvo tradukis J. SOLSONA.*

---

## BIBLIOGRAFIO

*La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donaco al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

**Esperanto kaj la blinduloj**, jarlibro por 1910. En lingvoj angla, franca, germana kaj esperanta, kun adresaro de la abonantoj de « Esperanta Ligilo ». Eldonita por la profito de la blinduloj. Entute 48 p. 11 × 18. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo: 25 centimoj (0,10 Sm.).

La partoprenintoj de niaj lastaj kongresoj eŭropaj kun emocio memoros la grupojn de blinduloj, kiuj troviĝis inter la kongresanoj. Ankaŭ ili ne forgesos la multajn penadojn, kiujn faris nombro da blindulamikoj, gvidataj de la senlaca Prof. Cart, por plidolĉigi la sorton de niaj nevidantaj kunfratoj per kreo de intelekta ligilo inter ili, egale al kiu nacio ili apartenas. Tiujn klopodojn, iliajn historion, sukcesojn kaj nunan staton priskribas la nun publikigita propaganda broŝuro. Ni esperu, ke per ĝi estos varbotaj novaj helpantoj laboraj kaj financaj por tiu nobla tasko, kiu fariĝis grava branko de nia tutmonda movado.

**Utileco de Esperanto por la blinduloj**, de PREZENTI LÉVY kaj aliaj. Kolekto de « Lingvo Internacia ». 20 p. 12 × 18. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo: 25 centimoj (0,10 Sm.). Dank' al malavara donaco de F-ino Hamand, la blindula gazeto

« Esperanta Ligilo » povis aranĝi konkurson ekskluzive por blinduloj, pri la temo dirita per la titolo. Alvenis naŭ raportoj, el kiuj tiu prezentata akiris la premion. Tamen, oni aldonis al tiu verko kelkajn paraĝrafojn de la aliaj disertacioj, por montri ĉiujn detalojn de la temo. Ĉiuj verkintoj konsentas plene en tio kaj ne laciĝas ripeti konstante, ke « Esperanto, faciliginte la unuigon de la tutmonda blindularo, alportos al ĝi pli da sendependeco, kaj tio estas por la blinduloj plej alta bono ». Por ni viduloj estas honora devo, helpi al tiu celo, atentigante blindulojn kaj blindulamikojn ĉiam kaj ĉie pri nia lingvo, kaj se eble, subteni mone la movadon inter ili (adreso por mensejoj : Prof. Th. Cart, Paris, 12, rue Soufflot). (*Germana Esperantisto*) H. M.

**La question de la langue auxiliaire internationale**, de GUSTAVE GAUTHEROT, doktoro de beletristiko, prof. en la Memstaraj Fakultatoj en Parizo. Antaŭparolo de vic-admiralo BAYLE. 314-paĝa (12 × 19). — Paris, Librejo Hachette, 79, Boul. St-Germain. Prezo : 3,50 fr. (1,40) Sm.).

Bonega, rimarkinda verko, taŭganta kiel grandefika propagandilo de nia lingvo kaj de l'esperantismo en franclingvaj landoj.

**Esperantista Poŝkalendaro 1911**, redaktita de Prof. D-ro SIEGFRIED LEDERER. 192 p. 11 × 16. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S. W. 68. Prezo : 0,50 Sm.

Tiu ĉi tre bele presita kaj elegante bindita poŝlibro enhavas ne nur kalendaron, sed multajn notojn, sciigojn kaj informojn utilajn por esperantistoj. Enigma konkurso kun premioj estas en ĝi.

**Sesa Universala Kongreso de l'Esperanto** (Washington, 14—20. Aŭgusto 1910). 73 p. 16 × 25. — Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris. Prezo : 1 fr.

Oficiala priskribo de nia Washingtona Kongreso; ĝi enhavas ankaŭ la nomaron de la kongresanoj.

### **Ankoraŭ pri la vortaro de S-ro Grosjean-Maupin.**

S-ro Grosjean-Maupin sendis al ni leteron, kies enpreson li postulis per juĝeja persekutisto kun minacoj pri procesoj, juĝistoj kaj tribunaloj. Tute ne pro timo ni ĝin enpresas, sed simple ĉar ni ne volis rifuzi al S-ro Grosjean-Maupin la eblon montri, ke ni « eraras » ! Se vere ni eraris, kiam ni kritikis tiun vortaron, tial ke ĝi kripligas vortojn de l'Universala Vortaro, forigas aliajn, prezentas novajn formojn apud la malnovaj, ne montrante tiujn, kiuj estas la vere esperantaj, laŭdas la Fundamenton en la Antaŭparolo kaj ĝin subfosas en la vortaro mem, — se vere ni eraris, tion diros niaj legantoj post legado de la letero de S-ro G.-M. — Nur pri unu punkto li insistas : pri la enkonduko de novaj vortoj. Tre certe ni tute malaprobas tian enkondukon, sed ne tie kuŝas la vera *kulpo* de la aŭtoro ... kaj pri la aliaj riproĉoj, pri la pli gravaj, kion li respondas ? Nenion !

Jen lia letero :

“ Sinjoro,

Bonvolu sciigi al viaj legantoj la jenon : Mi detale kaj plene respondas al S-ro CORRET kaj K<sup>o</sup> per letero, kies enpreson mi laŭjure trudos al la L. I. (1) La plejmulton de la vortoj, kiujn S-ro CORRET riproĉas al mi, mi ne elpensis mem, sed simple kolektis kaj registris, respektante la *naturan evoluadon* de la lingvo, t. e. akceptante senpartie kaj senprefere, eĉ kiam mi mem malaprobis, la diversajn opiniojn, tendencojn, kaj dezirojn de ĉiuj ajn esperantistoj, eĉ de lingvistoj kaj litera-

(1) La respondojn de D-ro Corret oni trovas ankaŭ en L. I.

turistoj (2). Mi facile per ekzemploj provas, ke la Doktoro batas tra mian dorson ne nur tre estimindajn esperantistojn kaj eminentajn Lingva-komitatojn, eĉ Akademianojn, sed ankaŭ, kio estas eble ekscesa, nian Majstron mem. Pri la *tre malmultaj* vortoj, kiujn mi mem proponis, mi demandas, pro kiaj sekretaj motivoj oni senkompatate rifuzas al mi rajton, kiun oni malavare konsentis al ĉiuj antaŭaj vortaristoj. Vi tre bone scias, ke la Doktoro povus elĉerpi el la estimataj vortaroj de S-roj RHODES, CHRISTALLER, GRABOWSKI, k. t. p., same facile kiel el la mia, tiujn burleskajn flikaĵojn (3). Ĉar la Doktoro pretendas, ke la traduko de mia antaŭparolo, publikigita en la *Revuo*, estas neĝusta, mi petas, ke li bonvolu citi precize la pecojn, kiuj ne estas ĝuste tradukitaj kaj en kiuj la argumentado kaj pruvado estas sangita kaj difektita (4).

Mi ĝojas, ke la kaprica kaj arbitra enkonduko de novaj vortoj fine naŭzas vin (5). Ĝi jam de tre longe naŭzis min. Estus akceptebla, kvankam diskutebla, ke oni malpermesus al ĉiuj ajn proponi novan vorton; sed estas vere strange, ke (ĉar silento estas konsento) oni konsentas tiun rajton al ĉiuj, esceptante nur unu solan. Ĉiu ja homo povas erari, sed tiuj, kiuj ne estas fakistoj, tute egale, kiel la aliaj. Oni preferas, plivole ol malkaŝe kaj metode diskuti, forlasi la lingvon al la danĝeraj hazardoj de la individua kaprico, kondiĉe nur, ke tiu kaprico estu senkonscia, senrezona kaj neracia. Ĉu la senkonsciaj emoj, kiuj, plej ofte, en la lingva kampo, estas nur apartaj naciaj kutimoj kaj preferoj, estas do pli gravaj kaj pli ŝatindaj ol la motivigita kaj pravigita opinio de iuj, kiuj, klopodinte por esplori la demandojn, pene akiris konscian kaj konsciencan opinion? (6)

Mi ĉiam kontraŭbatalis (ĉio, kion mi persone skribis, provas ĝin)

(2) La *natura evoluado* ne konsistas en tio, ke oni akceptas blinde ĉiun ajn vorton, kiu nur unufoje estis uzita aŭ nur proponita de iu ajn! La vortoj solaj, kies uzo farigis tute ĝenerala, kiuj vere « vivas », iom post iom eniras en la lingvon kaj estos oficialigitaj de la Akademio. Tio estas la *natura* evoluado; alia, *artefarita*, estas precipe la de S-ro Grosjean-Maupin uzita en lia vortaro: ĝin ni ne aprobas, ĉar vere nenatura, kontraŭnatura ĝi estas.

(3) Novajn vortojn neutilajn ni ĉie malaprobas, sed nenie oni trovas tiel grandan amason da novaj vortoj, kiuj duobligas, se ili ne *anstaŭas*, la jam *malnovajn*, klasikajn, nenie oni trovas *sistemajn, intencajn ŝanĝojn de nia Zamenhofa lingvo*. Tian flikaĵon oni povus fari nur elektante vortojn, kiuj ne havas respondan vorton en nia komuna lingvo, dum por granda parto de la Maupina flikaĵo vere esperanta vorto ekzistas!

(4) Franca teksto: « de savants éminents qui avaient, il est vrai, il faut bien le remarquer, le tort d'attribuer une importance exagérée à la valeur de théories spéculatives. »

Esperanta teksto: « eĉ eminentajn scienculojn, kiuj estis certe malpravaj... trograndigante la valoron de spekulaciaj teorioj, sed kiujn oni ne devus malĝentile kaj maldece trakti, kiel ĝenantajn intrudulojn kaj neatenditajn kunmanĝantojn. »

La vortoj *kursive* presitaj ne ekzistas en la franca originalo. Kial S-ro G.-M. ilin aldonis, oni komprenos, se nur oni legas en L. I. la plenan kritikon faritan de D-ro Corret, kie li tradukis esperanten la cititan francan frazon... sen aldono!

Tiun lokon tuj rimarkis D-ro Corret. Ĝi verŝajne ne estas la sola, sed eĉ se ĝi estus la sola, ĝi sufiĉus por pravigi la diron de D-ro Corret, ke « la traduko ne estas ĝuste konforma al la franca originalo ».

(5) Ĝi ĉiam naŭzis nin. Sed ĉu por nin naŭzi S-ro G.-M. verkis sian vortaron?

(6) Bone! Sed kial do S-ro G.-M. akceptis nur forĵetindajn individuajn principojn?

kaj mi ĉiam kontraŭbatalos la invadon de nenecesaj aŭ malbonaj neologismoj, pri tio mi tute konsentas kun miaj atakantoj, sed mi tute malkonsentas, kaj tio estas mia nepardonebla krimo, pri la maniero kontraŭbatali tiujn, kiuj ne samopinias, kiel mi: mi kredas, ke ĉia ajn, eĉ ne mia, sincera opinio estas respektinda kaj racie diskutinda; ĉar mi ne imagas min ĉioscianta nek neerarema, mi estas ĉiam preta aŭskulti la malsamajn opiniojn, respondi serioze al la demandoj kaj proponoj, eĉ kiam ili ĝenas min; mi neniam rifuzas, eĉ se tio postulas grandan laboron, esplori la problemojn; mi preferas klarigi la raciajn kialojn de miaj opinioj aŭ ankaŭ de miaj hezitaj kaj skrupuloj (?). Mi estas konvinkita, ke mia vortaro, kiun vi tiel akre kulpigis kaj eĉ duonidista nomis, povos, male, fari servon al Esperanto kaj utili por kribrigi kaj plifortigi nian lingvon<sup>(8)</sup>. La estonto diros, kiu estas prava, kaj kiu estas pli sincere fidela, pli prudente konservema, pli konfidema al la valoro de la Fundamenta lingvo, fine pli plene obeema al la *Zamenhofaj* ekzemploj.

Januaro 1911.

E. Grosjean-Maupin."

Nur bedaŭrinde estas, ke la Vortaro mem vere ne akordiĝas kun tiuj belaj deklaroj....

Cetere, ne nur *Lingvo Internacia* kaj *Juna Esperantisto*, sed ankaŭ aliaj — gravaj — gazetoj akceptis malfavore la verkon « Dictionnaire complet Esperanto-Français » de S-ro E. Grosjean-Maupin. Ni citu: *Pola Esperantisto* (Varsovio), *La Ondo de Esperanto* (Moskvo), *Danubo* (Bukaresto), *Normanda Stelo* (Rouen), *The British Esperantist* (Londono), *Le Monde Espérantiste* (Parizo). La recenzoj legataj en la kvin unuenomataj gazetoj estas tute aŭ parte represitaj en la januara kaj februara numeroj de *Lingvo Internacia*.

Aliparte, la « Unua Esperantista Grupo de Hamburgo-Altona, kun aligo de la 5 aliaj tieaj grupoj, publikigis *Proteston* kontraŭ tiu kontraŭ-Fundamenta Vortaro. Jam multaj Lingvakomitatoj aliĝis al tiu Protesto, sendante ĝin al la Direktoro de l'Vortara Fako de la Esperantista Akademio, kiu, siavice, laŭ sia tasko, *oficiale* raportos pri la afero.

Kiel oni vidas, la opinio de *Lingvo Internacia* kaj *Juna Esperantisto* tute ne estas izolita, kaj ilia kritiko estis senpartia kaj justa.

Per la ĉi-supra artikolo ni konsideras la aferon finita. « *Juna Esperantisto* » estas belėtristika gazeto; ni ne plu volos plenigi tutajn paĝojn per polemikaĵoj. En la jena escepta okazo ni tamen devis atentigi nian legantaron pri tiu verko danĝera al la unueco de Esperanto. Ni eldiris nian neŝanĝeblan opinionon, ni montris la kritikojn de aliaj; do, pri tiu ĉi temo ni ne plu deziras reparoli.

LA RED. DE « JUNA ESPERANTISTO ».

## PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

**Interne, ekstere.** (Responde al S-ro M. B.) — La radiko « intern » ne estas uzebla sen gramatika termino, — la radiko « ekster » jes. Tion ĉi certigas la *Universala Vortaro*. El tio ĉi konkludiĝas, ke

(7) Se vi parolas pri nefundamentaj principoj aŭ vortoj, ni plene konsentas. Pri tio neniu vin riproĉis, kaj ni vin plene aprobas.

(8) Ĉu la vere scienca Vortaro de S-ro Boirac ne plene sufiĉis?

LA RED. DE J. E.

«intern» devas nepre alpreni iun gramatikan terminon; ĝi do ne estas konsiderebla kiel prepozicio. Sekve, ĝi, en adverba formo («interne») ne povas antaŭi la koncernatan substantivon sen akompano de prepozicio; oni devas do diri: «interne *de* la domo» aŭ «interne *en* la domo» (tutsame kiel oni diras: «supre *de* la monto» aŭ «supre *sur* la monto»). Se oni forlasus la akompanan prepozicion, la frazo estus aŭ sensenca aŭ alisenca: «interne la domo estas ruino» signifas, ke la interna parto de la domo estas ruino, — dum «interne *de* (aŭ *en*) la domo estas ruino» signifas, ke en la domo troviĝas ruino, kvankam la domo mem estas eble sendifekta.

«Interne» ĝenerale montras *lok*on, sed figure ĝi estas uzebla ankaŭ en la senco de «intime, sincere»; ekz. «mi interne amas vin».

«Ekster» — kiu esence estas la malo de «en» (*enlando* — *eksterlando*) — estas uzata kiel prepozicio, sen alpeno de gramatika termino kaj sen akompano de alia prepozicio; ekz. «ekster la domo», «ekster konkurso». Se oni ĝin uzas kun prepozicio, ĝi devas alpreni gramatikan terminon; ekz. «li estas ekstere *de* la domo»; «mi lin kondukis eksteren *el* la kuirejo» (t. e. en la koridoron, aŭ en la korton, en la straton, k. t. p.). Se ni dirus nur: «... *ekster* la kuirejo», ĝi signifus, ke ni ne estis en la kuirejo, kiam mi lin kondukis; kaj se ni dirus simple: «... *el* la kuirejo», signifus, ke mi igis lin per mia konduko forlasi la kuirejon, ne esprimante, *kien* mi irigis lin, — eble en la ĉambron, do tute ne eksteren. Kiel oni vidas, tiu ĉi uzmaniero estas iom analogia kun la uzado de «kune kun».

«Ekster» ĝenerale montras ĉu *lok*on, ĉu *temp*on; ekz. «ekster la domo», «ekster la laborhoroj», — sed oni povas ĝin uzi figure (vidu pli supre: «ekster konkurso»), kaj ankaŭ en la senco de «escepte», «krom»; ekz. «ĉiuj estas hejme, ekster Viktoro (t. e. Viktoro ne estas hejme)».

La ekzemplo «Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne» donita en la *Ekzerco* (§ 26), en mala senco estus do: «Mi staras interne de la domo, kaj li estas ekstere».

## HUMORAĴOJ

**Naive.** — Kien vi iras tiel frumatene? — demandas Paŭlo de sia juna kamarado, Rudolfo.

— Kolekti fungojn en la apuda arbaro, — la demandito gajvoĉe respondas, svingante plenigotan korbon.

— Sed, ĉu vi konas la venenajn?

— Trankviliĝu, amiko; la fungoj ne estos por manĝi, ili estos ja donacotaj al sinjoro advokato.

**Silentego.** — Maljuna instruisto, admonante la lernantojn kondukti silente, diras:

— En nia tempo la lernantoj tiel silente sidadis en la klaso, ke ne nur oni povis aŭdi, kiel flugas muŝo, sed eĉ ĉe kiu el la lernantoj en la oreloj sonoras.

**Malofta okazintaĵo.** — Fervoja biletvendisto alkondukis sian seĝaran filon al kuracisto.

— Kion li havas? — demandas la doktoro.

— Jen dum tuta semajno li sentas doloron en la internaĵo, kaj plej mirinde estas, ke la doloro vagas: jen la ventro doloras, jen la stomako, jen la doloro proksimiĝas al la gorĝo, poste ĝi malsupreniras, kaj veninte ĝis malsupro, ĝi ree supreniras. Versajne li glutis ranon.

— Nu, bone, mi tuj rigardos, — diris la doktoro kaj esploris la knabon per Röntgen-radioj. Post la ekzameno la doktoro ekridis.

— Estas malgrava afero! — li diris. — Mi receptos vomigilon. Donu ĝin al li kaj li tuj resaniĝos. Li simple englutis fervojan bileton por vojaĝi tien kaj reen.

**Rilato.** — *Kampano*: Ĉu via patro estas hejme? — *Filo de veterinaro*: Ne, li ne estas hejme. Kion vi deziras kun li? ĉu via ĉevalo estas malsana? — *Kampano*: Ne la ĉevalo, sed la ĉevalido. Bonvolu do veni ĉe min vi, via junula moŝto; bestidon ja povas kuraci bestkuracistido.

**Malagrabla.** — Sinjoro Prakt vizitas sian amikon, sinjoron Teor. Li trovas lin en tre malbona humoro.

— Kial vi estas tiel malĝoja? — li demandas.

— Ho, — respondas Teor, — mi volas pendigi sur la muron ĉi-tiun pentraĵon, kaj mi ne trovas mian martelon kaj najlojn.

— Kiel tio povas esti? Vi ja havas specialan notkajeron, en kiu ĉiuj viaj objektetoj estas inventare enskribitaj, kaj ankaŭ markite, kie ili troviĝas. Rigardu do ĝin.

— Jes, jes; sed ankaŭ la notkajeron mi ne retrovas.

## NIAJ KONKURSOJ

*Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 \$, — 2) samon en valoro de 1 \$, — laŭ elekto de la premiotoj.*

Verku frazon konsistantan nur el kunmetitaj vortoj. — Gramatikaj terminoj, kiuj ne estas uzeblaj memstare (t. e. sen aldonigo al iu radiko), ne estas konsiderataj kiel elementoj de kunmetitaj vortoj.

La frazo devas esti gramatike perfekta kaj klarsenca.

Bonvolu sendi la respondon al ni antaŭ la 1-a de Majo 1911.

Ni rememorigas niajn legantojn pri la partopreno al la juĝado de nia lasta konkurso (legu en la januara numero, paĝoj 15-16).

## Korespondado de la Redakcio.

Ni petas tiujn personojn, kiuj deziras ricevi de ni leteran respondon, ke ili bonvolu sendi al ni internacian respondan poŝtkarton aŭ internacian poŝtan respondkuponon.

*Al S-ro D. de S.* (Bp.) — Tre kore ni dankas vian varman leteron. Ni ĉiam tre ĝojas, kiam ni ricevas tiel intimajn vortojn, kiajn vi skribis al ni; ili pravas, ke la skribinto bone komprenas la sencon de la « interna ideo », kunliganta la esperantistaron en « unu grandan rondon familian ». — Koran saluton!

*Aleĉjo.* — Ne estas tiel sukcesinta, kiel la alia. Ni ne presos ĝin.

*Al S-ro J. M.* — Kvankam via artikolo estas bazita sur logikon, ni ne tute povas ĝin aprobi. La *Fundamento* jam solvis tiun demandon. La uzado de *x* anstataŭ *ks* estas *malĝustajo*, ne nur ĉar ĝi *kontraŭas al la Fundamento*, sed ankaŭ tial, ĉar ĝi malkonformas al la spirito de Esperanto kaj difektas la plenfonetikecon. Dankon!

*Al F-ino E. R.* — 1) Kun plezuro. 2) Antaŭ la fino de Aprilo.

*Presotaj verkoj*: Brahmano kaj papilio; Regido-Ĝibulo; La pomo; La malgranda ventumilo; Tri patrinoj; En la spaco; Ahasvero; Infanaro.